der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

16. Jahrgang Nr. 100 (2/1980) ISSN 0014-0619 30 Pf

Por plua malstreĉiĝo!

Wir Teilnehmer der 10. erweiterten Tagung des Zentralen Arbeitskreises Esperanto, die wir die im Kulturbund der DDR organisierten Esperantisten repräsentieren, bringen unsere Sorge zum Ausdruck über die Verschärfung der internationalen Lage, die von den USA und anderen NATO-Staaten herbeigeführt wurde.

Wir sehen in den NATO-Beschlüssen von 1978 und 1979, der Sabotierung des SALT-II-Abkommens, in der Olympia-Boykotthetze und in den verschiedenen jüngsten Maßnahmen der Carter-Administration sowie anderer NATO-Staaten den gefährlichen Versuch, die Politik der friedlichen Koexistenz, der Abrüstung und Entspannung zu torpedieren. Diese Machenschaften richten sich gegen die Interessen aller Völker und aller friedliebenden Menschen.

Wir erklären unseren festen Willen, die von der Sowjetunion initiierte und konsequent verfolgte Friedenspolitik mit all unseren Kräften und den spezifischen Möglichkeiten der internationalen Sprache Esperanto zu unterstützen und einen wirksamen Beitrag zur Stärkung der weltweiten Friedensbewegung zu leisten.

Ni partoprenintoj de la 10a pliampleksigita Kunsido de Centra Laborrondo Esperanto, reprezentantaj la esperantistojn organizitajn en Kulturligo de GDR, esprimas nian grandan zorgon pri la pliakriĝo de la internacia situacio, kaŭzita de USONO kaj aliaj NATO-ŝtatoj.

En la decidoj de NATO el la jaroj 1978 kaj 1979, en la sabotado de la SALT-II-Traktato, en la bojkotcela agitado kontraŭ la Olimpikaj Ludoj kaj en la diversaj lastatempaj paŝoj de la Carter-administracio kaj de aliaj NATO-ŝtatoj ni vidas la danĝeran provon, torpedadi la politikon de la paca kunekzistado, de malarmado kaj malstreĉiĝo. Tiuj maĥinacioj sin direktas kontraŭ la interesoj de ĉiuj popoloj kaj ĉiuj pacamaj homoj.

Ni deklaras nian firman volon, ke per ĉiuj niaj fortoj kaj la specifaj eblecoj de la internacia lingvo Esperanto ni volas subteni la pacpolitikon iniciatitan de Sovetunio kaj konsekvence de ĝi realigatan – kaj efike kontribui al la plifortigo de la tutmonda pacmovado.

Berlin, den 10. Februar 1980

Unika, animskua, admona!

Bildlibro pri la atombombo

„Estis mateno agrable serena; oni antaŭvidis ardan varmegon kun la koruso de cikadoj kiel kutime en somero.

Hirośima, la 6an de aŭgusto 1945, je la 8a horo, 15 minutoj.

Matennebulo jam forpasis sub la intensa sunbrilo, kiu ankaŭ tiutage aŭguris tipan somertagon kun varmego.

Nagasaki, la 9an de aŭgusto 1945, je la 11a horo, 2 minutoj.

Jen la fatalaj momentoj, kiam du atombomboj de la usona armeo, urania kaj la alia plutonia, unuafoje uzitaj en milito, atakis la du urbojn. Ili pereigis 130 000 — 140 000 homojn en Hirośima kaj 60 000 — 70 000 en Nagasaki“.

Aperis 1979 en Japanio libro pri la sekvoj de la unua atombombado. „Hirośima — Nagasaki. Bilda Dokumento pri la Atombombado“. La ampleksa 350paĝa librego entenas 390 fotojn kolorajn kaj nekolorajn, kiuj estas faritaj horojn post la bombado aŭ jarojn poste (ĉar atombomba malsano ankoraŭ hodiaŭ rabadas vivon de travivintoj) kaj 93 kolorajn bildojn, kiuj estas desegnitaj surloke aŭ pentritaj de la bombitoj („hibakŝoj“) mem.

Entute oni elektis tre zorge el materialo de pli ol 4000 fotoj kaj 2500 desenaĵoj. Multaj fotoj nur lastatempe estas disponigitaj de la usona marmarmeo. Preskaŭ ĉiuj fotoj estas faritaj rekte de la originalaj klišoj de la posedantoj. La libro estas verŝajne unika en la mondo. La eldonadon de la libro ebligis per sia mono 15 000 japanaj civitanoj, kiuj formas la bazon por la „Komitato de Japanaj Civitanoj por sendi Donacajn Kopiojn de Bilda Dokumento de la Atombombado al Niaj Infanoj kaj Kolegaj Homoj en la Mondo“.

Ĝis nun aperis eldonoj en la japana, angla, hispana lingvoj kaj en Esperanto.



Dum la somero 1979 delegitaro de tiu-ĉi komitato traveturis kelkajn eŭropajn landojn kaj ankaŭ, fine de aŭgusto, estis gastoj de la „Packonsilantaro de GDR", por transdoni la librojn al la reprezentantoj de GDR. Du reprezentantoj de la Japana Pacdefenda Esperantista Asocio (= la japana MEM-sekcio), nome Kimiaki Kurita kaj Ikuo Senga, kiuj apartenis al la delegitaro, transdonis ekzemplerojn de la esperantolingva eldono al la prezidanto de Centra Laborrondo Esperanto, Rudolf Hahlbohm.

Tiom pri la faktoj. Nun iom pri la fono de la verko. Ni legas: „Kiel eble plej frua efektivigo de la kompleta abolicio de nukleaj armiloj kaj de la plena malpermeso de atom- kaj hidrogenbomboj — tion forte aspiras ĉiuj homoj en la mondo. Ni devas nepre komuniki al la sekvantaj generacioj kaj al ĉiuj homoj en la mondo la neniam ripetendan tragedion de Hirošima kaj Nagasaki. Tiu arda deziro kovis kaj naskis tiun ĉi libron. La projekto startis per ideo hazarde ekhavita.

En iu mezlernejo en Gubernio Hirošima la lernantoj regule sendadis al aliaj mezlernejoj en la lando lernomaterialojn pri la atombombado, kiujn ili ricevis de siaj instruistoj kaj gepatroj. El tio sekvis, ke en iuj lernejoj oni ekhavis lecionojn pri la atombombado, kaj ke naskiĝis kontakto inter la geknaboj jen per korespondo jen per rekta renkontiĝo.

Ĉu do ne eblos fari la samon adrese al la tutmondaj popoloj? Tio estis la ideo trafinta unu patron, kiu vizitis Hirošimon kune kun siaj infanoj kaj estis forte impresita de la valora agado de la geknaboj. Li tuj parolis al siaj amikoj pri la sugesto, kaj tiel komenciĝis la tuta afero."

Kion diri pri la fotoj mem? Ili estas tiom teruraj kaj animskuaj, ke apenaŭ sufiĉas la homa lingvo sin esprimi. Tro malmultaj ja scias pri tio, kio okazis 1945 al tiuj du urboj. Ĝi estas la infero laŭ ĉiuj eblaj variantoj de imago-povo. Se oni trafoliumis la libron, oni ekkomprenos, kio atendos la mondon, se oni ne sukcesas bridi la militpreparantojn.

Por ke la libro ankaŭ aperu en Esperanto, esperantistoj-subtenantoj el Japanio fondis apartan asocion por akceli la eldonadon. Deko da esperantistoj tradukis la tekston sub la kontrolo de Konisi gaku.

Povas okazi, ke japana esperantisto donacos tiun verkon al sia eksterlanda amiko. Tiam tiu nepre sendu sian impreson al „Hirošima-Nagasaki o sekaj e okuru esperanto no kai" ĉe Japana Esperanto-Instituo, Wasedamati 12-3, Siuzyuku-ku, Tokio, 162 Japanio. La libro estas forta kaj siaspece unika alvoko al la homaro, ĉion entrepreni por ke finfine ekhaltu la vetarmado, venu la plena kaj senkondiĉa malarmado kaj estu sekurigita la paco. En tiu strebado la esperantistoj de GDR estas plene je la flanko de la japana civitana komitato.

*

Denove Esperanto-suplemento

La konata soveta internacipolitika semajnrevuo „Novaĵoj el Moskvo" (Moscow News) aperigis en n-ro 51 (2883) de 23. 12. 1979 la paroladon de L. I. Breĵnev dum la solena kunsido okaze de la 30a datreveno de la fondiĝo de GDR, la 6an de oktobro 1979, en la Esperanta traduko.

Kiel konate, en tiu-ĉi parolado L. I. Breĵnev informis pri la decido de la sovetunia registaro pri unuflanka redukto de sovetaj trupoj en GDR. Bedaŭrinde tiu klara montro de bona volo ne estis aprezita flanke de la NATO-membroj.

A. Kabus

Bonfaraĵo laŭ usona maniero

Kontraŭ sumo de ĉirkaŭ 90 000 M la pensiuligita usona generalo *Paul W. Tibbetts* vendis al viktimo de la faligo de atombombo sur urbon Hirośimo la dokumentojn de la aviadilo B-29 „Enola Gay", kiu entreprenis la unuan nukleo-armilan atakon. Temas pri loglibro, kion skribadis kunpiloto Lewis por la gazeto „New York Times". Tibbetts estis komandanto de la 13-kapa teamo de la aviadilo, el kies bombośakto falis la atom-morto sur Hirośimon.

Komence oni intencis aŭkcii la dokumentojn, sed poste akiris ilin la 46-jara japano *Sumio Simodoi.* Li troviĝis 3 km for de la epicentro de la eksplodo, survoje al lernejo, kiam Tibbetts ordonis la faligon. La dokumentojn li volas transdoni al la muzeo por la atombombaj viktimoj de Hirośima, kiel eterna akuzo pri la usona nukleo-armila krimo.

Tibbetts motivigis la vendon tiel, ke de li estis petata obolo por bonfareca bazaro favore al damaĝitaj infanoj, kio memorigis lin denove al la infanoj mortigitaj aŭ kripligitaj en Hirośimo.

La aviadilaj dokumentoj enhavas rimarkojn, kiuj pruvas la cinikismon, kun kiu la atombomba atako estis realigita. Ili liveras krome indikojn pri la fakto, ke Usono uzadis Hirośimo-n kaj tri tagojn poste Nagasakio-n kiel laboratorioj por sia posta nukleo-armila strategio. Super Hirośimo kune kun la nomita laŭ la patrino de Tibbett „Enola Gay" estis la mezurad-aviadilo „The Great Artiste" kaj dua akompana aviadilo, kiuj havis la taskon registri la amplekson de la detruoj kaj la intensecon de la radiado.

(Trad. L. Knöschke. Laŭ „Tribüne" 28. 11. 1979)

*

Kia teruriga timiga rakonto!

Kia majstra psikologie konvinkiga dramo!

Preskaŭ nur unu persona akto, ĝi inkluzivas la homaron, kvazaŭ akvoguto respeguligas la mondon.

En la rakonto **„Malriĉaj Homoj"**, esperantigita de Károly Bodo — Zsigmond Móricz konatigas al ni soldaton kiu post dudekmonata vivo en tranĉeo revenas en la ĉiutagan grizan mondon de la malriĉa, preskaŭ servutula vilaĝano, por „ĝui" 28-tagan senmilitan libertempon. Do, ege limigita kadro de spaco kaj tempo. Dum nur unu tagnokto la animskua dramo ekestas, kulminas kaj solviĝas, lumigante la tutan tragedion de la milito: La renverso de ĉiuj homaj leĝoj kaj moralaj principoj. Laŭ ordono amiko fariĝu malamiko, krimo fariĝu heroaĵo kaj inverse.

Ĉu simpla, meditema vilaĝano tion povas kompreni? Ne! Ĉu intelektuloj kaj kleruloj tion komprenas? La estonto donu al ni la ĝustan, deziratan respondon!

La lingvo adekvatas al la rolantoj kaj ilia mondo, ĝi estas simpla, preskaŭ arkaike „ŝparema", kio efike altigas la dramecajn konfliktojn. Per lingvaj rimedoj Z. M. ebligas al eksterlandoj la komprenon de hungaraj cirkonstancoj, historio kaj homoj.

Honore al Sovetunio, kiu donis la ĉefan kontribuon al la liberigo de la germana popolo el la jugo de faŝismo.

Manfred Arnold

Dankon al Sovetunio!

1. *Tiam, antaŭ tridek kvin' da jaroj*
   vi alportis pacon al homar',
   ĉar vi estis kontraŭ la barbaroj
   kaj iliaj sangaj malbonfaroj
   firma nevenkebla pacrempar'.

2. *Multajn milionojn da oferoj*
   donis vi dum lasta mondmilit',
   estis vi certeco de l'esperoj
   kontraŭ rabo, morto kaj suferoj.
   Ĉiam estos via la merit'!

3. *Vi asistas arde al progreso*
   kaj al paco ĉie en la mond'.
   Kontraŭ ĉiu provo de agreso
   kaj por malstreĉiĝa mondproceso
   estas vi nelacigebla font'.

4. *Malarmado estas via celo,*
   ke feliĉe floru la soci'.
   Pac' eterna estas la modelo,
   ne milito aŭ popolkverelo!
   Kaj por tio daŭre luktas vi.

5. *Ĉiam vi subtenas la amikojn:*
   Malgraŭ via detruita land'
   vi transdonis sciojn kaj fabrikojn
   kaj lernigis nin laborpraktikojn,
   estas nia bona konsilant'.

6. *Al popolo, kiu jam libera,*
   konstruanta jam sur propra grund',
   kaj al tiu, en sklavec' mizera
   estas certa via am' sincera,
   via amikeco en abund'.

7. *Eĉ al malamiko vian manon*
   vi prezentas, por konvinki lin,
   ke kun ni li faru pacan planon,
   ke ni venku la militmalsanon
   kaj por ĉiam ni forigu ĝin.

8. *Do, al ĉiuj homoj por futuro*
   donas certan optimismon vi,
   ĉar vi estas al homar' fulguro
   kaj belega lumo en obskuro!
   Vin por ĉio ĉi nun dankas ni!

de Manfred Arnold

*

ASE en Ukrainio

La 29-an de januaro 1980 estis fondita Ukrainia Respublika Filio de Asocio de Sovetaj Esperantistoj (URF ASE).

La fondan konferencon partoprenis apud 50 delegatoj de ukrainiaj E-kluboj de 15 loĝlokoj de la respubliko. La konferencon partoprenis prezidanto de ASE doktoro de filologio profesoro M. I. Isajev.

La konferencanoj detale pridiskutis la staton kaj problemojn de E-movado en la respubliko kaj signis ĉefajn labordirektojn de la fondata ASE-Filio. Estis elektitaj gvidorganoj de URF ASE. La prezidanto estas docentino E. V. Majvurova.

La Filio efektivigos sian laboron per E-kluboj de Ukrainio kaj funkcios sub patronado de Ukrainia Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando, kaj kun helpo de la respublikaj sindikataj kaj junularaj organizaĵoj.

E. V. M.

La 22an de aprilo 1870, antaŭ 110 jaroj, naskiĝis Vladimir Iljiĉ Lenin.

MLADEN ISAEV
(bulgara poeto)

L E N I N

Pri Lenin skribi estas ne facile.
Al ni li venis kvazaŭ el fabel'.
Li la vunditan teron perpupile
rigardis kiel aglo el ĉiel'.
Kaj tie, post montegoj el sufero,
li vidis nian vivon de l'estont':
ripozas la popoloj sur la tero —
post la ribeloj — en amika rond' ...

Ripozas pace li ĉe l'Kremla turo.
Kolĥozaj kampoj ondas en la step'.
Kvin kontinentoj iras en konkuro —
kun Lenin ekirinte — en la Lenin-temp'.
De ocean' al ocean' ruliĝas
de nia vero la vivanta ond'.
Kaj Lenin-penso kiel sun' vastiĝas,
lumigas ĉiujn spacojn de la mond'.

Vi, kuntempulo, marŝas nun ... serenas
kaj estas klara kaj senbara via voj'.
La verda ter' al vi jam apartenas,
disfloras jam la branĉoj de la ĝoj'.
En horoj maltrankvilaj kaj timindaj
al Lenin fiksas la okulojn vi,
kaj tiam povas vi atingi pintojn
neniam atingitajn tie ĉi.

Trad. A. Grigorov

★

Por pri profundaj ligoj

La tradiciaj amikaj ligoj inter la esperantistoj de Dresden kaj Leningrad ricevis novan fundamenton per la subskribo de kontrakto pri kunlaboro por 1980—1981, kiun subskribis fine de la jaro la prezidantoj de la leningrada filio de ASE, B. Stefanov kaj de DLE Dresden, W. Röhner. La kontrakto i. a. antaŭvidas aktivan kunlaboron en MEM, kontaktoligadon kun aliaj kulturfakoj (filatelistoj, fotoamatoroj, popolartaj amatoroj k. t. p.), esploron de la historio de la lokaj laboristaj esperantistaj organizaĵoj, reciprokajn vizitojn kaj korespondadon.

100

Jen, estiminda jubileo: 100 numeroj de nia „der esperantist“, la organo de Centra Laborrondo Esperanto, modesta kaj firma informilo, de iuj laŭdata de aliaj atakata! Esperantista revueto klopodanta reflekti kaj samtempe influi la specifan profilon de la esperantistaro en GDR, kiu estas organizita en Kulturligo. Dum sia 7a plenkunsido dum februaro 1979 en Schwerin CLE detale traktis pri „der esperantist“ surbaze de analizo ellaborita de Siegfried Linke pri la jarkolektoj 1975 — 1978.

Estas tute kompreneble, ke pri la celoj de la revueto ekzistas tiom da diversaj opinioj kiom da gustoj. Ne eblas respondi al ĉies postulo. „der esperantist“ devas samtempe plenumi kelkajn funkciojn, kaj, tio estas malfacila. Temas pri jenaj taskoj:

— gvidado de la agado laŭ politika-ideologia, faka, lingva kaj organiza vidpunktoj,

— prezento de la ĉefaj agadlinioj kaj rezultoj de la agado de esperantistoj de GDR kaj ebligo de spertinterŝanĝo,

— informado pri la internacia Esperanto-movado,

— prezento de sciencaj materialoj (interlingvistiko/esperantologio)

— helpo al lingva kleriĝo,

— distro.

Oni postulas, ke la revueto donu ion al la klera esperantisto kaj al la komencanto. Ĝi estu legebla por eksterlandano, por GDR-esperantisto kaj kulturliga aktivulo neesperantista. Ĝi estu, ĝi devu, ĝi faru ...

Nu — por ne senbaze diskuti, ni vidu la analizon de la jarkolektoj 1975 — 1978:

„der esperantist“ aperadas ekde 1965 kun la subtitolo „Informilo de la Esperanto-amikoj en Kulturligo de GDR“, sed kompreneble fariĝis la politika kaj faka organo de Centra Laborrondo Esperanto. Ĝi aperas 6 foje kun 24-paĝaj kajeroj. Ĉirkaŭ 90 % de la artikoloj estas esperantlingvaj. Kelkfoje enestas ilustraĵoj. Ĝis n-ro 2/80 entute aperis 2400 paĝoj. La redaktoroj estis Eugen Menger kaj poste Raimund Knapp. Ekde n-ro 42 (1970) la revueton redaktas d-ro Detlev Blanke. La disdivido de la kontribuoj laŭ enhavo por 1975 — 1978:

1.	Bazaj politikaj kaj fakaj materialoj por la agado de la esperantistoj de GDR/ informoj pri la realigo de „Gvidprincipoj“/ praktika apliko de Esperanto por la realigo de sociaj celoj	33,6 %
2.	Sciencaj, fakaj kaj metodikaj materialoj	14,5 %
3.	Kontribuoj pri antiimperialismaj kaj aliaj socipolitikaj aktualaj problemoj	8,3 %
4.	Esperanto en la socialismaj landoj kaj problemoj de la kunlaboro	15,5 %
5.	Esperanto en nesocialismaj landoj	9,0 %
6.	Recenzoj, literaturo, distro, koresponddeziroj	18,1 %

De 615 koresponddeziroj el 41 landoj (1975—1978) 90,2 % venis el socialismaj landoj (laŭvice el Bulgario, Sovetio, GDR, Pollando, ĈSSR, Rumanio, Hungario).

En la 24 kajeroj aperis kontribuoj de 74 diversaj aŭtoroj. De ili 33 estas el GDR, 33 el aliaj socialismaj landoj kaj 8 el nesocialismaj landoj.

62 % de la materialoj estis de iom baza naturo kaj malpli ligitaj al aktualeco. 38 % estis precipe aktualaj.

La parto de la originale verkitaj artikoloj (do nek tradukoj nek represoj) altiĝis de 1975 (jarkolektoj kun 144 paĝoj) de 107 paĝoj al 132 paĝoj en 1978.

*

15 jaroj esperantistoj en Kulturligo de GDR

Dek kvin jarojn la esperantistoj de GDR agadas en Kulturligo. La 31an de marto 1965 kelkaj iamaj laboristaj esperantistoj kaj du junuloj fondis la Centran Laborrondon Esperanto en Kulturligo. Al la fondintoj apartenis i. a. nia neforgesebla Rudi Graetz, la nuna prezidanto de CLE, Rudolf Hahlbohm, la vicprezidanto Ludwig Schödl, Otto Bäßler el Leipzig kaj, kiel sekretario de CLE, Eugen Menger.

Dum tiuj dek kvin jaroj multaj esperantistoj kaj amikoj de la internacia lingvo en kaj ekster Kulturligo faris konsiderindan laboron, tiel, ke ni hodiaŭ povas konstati gravajn rezultojn. Eble la unuopulo ilin ne ĉiam konscias. Ni volas resumi almenaŭ la plej gravajn:

1. Kreo de firma kaj stabila organiza bazo por la sociutila aplikado de Esperanto kaj por ĝia instruado en la kadroj de Kulturligo.
2. Ellaboro de gravaj bazaj konceptoj kaj analizoj pri la celoj kaj ebloj de socia agado sub socialismaj kondiĉoj ĝenerale, kaj aparte sub tiuj en GDR. Ĉe tio la specifa loko de la esperantistoj en Kulturligo donis gravajn aspektojn por la enkadrigo de la esperantistaj aktivecoj kiel kulturpolitika agado en socialisma GDR.
3. Akiro de internacia estimo por la agado de la GDR-esperantistoj.
4. Rezultoj en la diverssfera apliko de la lingvo por informado pri GDR, por ligo de amikeco al esperantistoj en socialismaj kaj nesocialismaj landoj.
5. Ellaboro de bazaj materialoj pri teorio kaj praktiko de Esperanto.
6. Atingo de ĝenerale objektiva scio pri Esperanto en politikaj, sciencaj kaj aliaj sociaj medioj de la ŝtato.
7. Kreado de instrumaterialoj, vortaroj kaj aliaj bazaj fakmaterialoj.
8. Kreado kaj edukado de socipolitike kaj fake kapablaj funkciuloj.

Entute oni povas diri, ke la eblecoj de agado, kiujn al la esperantistoj donis la socio kaj la ŝtato kreskis multe pli rapide ol la kapabloj ilin akcepti kaj utiligi. Novaj perspektivoj staras antaŭ ni. La okdekaj jaroj montros, ĉu ni kapablos ilin kompreni.

10-a pliampleksigita, kunsido de CLE

Pli ol 100ano, membroj de CLE kaj prezidantoj de la subdistriktaj Esperantaj grupoj en Kulturligo de GDR, kunvenis la 9an kaj 10an de februaro 1980 en Berlin, por partopreni la 10an kunsidon de CLE, ĉi-foje pliampleksigitan. Oni analizis la internacian streĉitan situacion, kaŭzitan de la NATO-rondoj kaj akceptis koncernan deklaron.

Multe da tempo oni dediĉis al la skizado de aktualaj trajtoj de la internacia Esperanto-movado kaj al problemoj de la esperantista agado en GDR.

Por 1980 tre grave estas, bone prepari kaj okazigi la elektojn de la gvidantaroj de la subdistriktaj Esperanto-grupoj kaj de la distriktaj laborrondoj (gvidantaroj). Komunan direktivon akceptis la prezidio de CLE.

Gravan lokon plue havis la junulara agado kaj informoj pri kurantaj aferoj.

Kongrue kun la kontrakto pri kunlaboro inter PEA kaj CLE la ĉeestantoj povis saluti kaj aŭskulti delegitaron de la ĉefestraro de PEA, la vicprezidanton mgr. Andrzej Grzebowski kaj la prezidanton de la pola MEM-sekcio, mgr. Lech Kosieniak. Iliaj prelegoj kaj respondoj al demandoj sendube servos al plua intensivigo de la kunligoj inter la esperantistoj de ambaŭ landoj.

★

Distingoj per la Honorinsigno de CLE

Dum la 10a pliampleksigita kunsido de CLE la 9an kaj 10an de februaro 1980 en Berlin estis distingitaj jenaj meritplenaj esperantistoj de GDR:

— *Dieter Berndt, Berlin*
— *Dr. Detlev Blanke, Berlin*
— *Hans Diedrich, Schwerin*
— *Jürgen Hamann, Leipzig*
— *Kurt Heeg, Fraureuth*
— *Hans Heinel, Oederan*
— *Elise Hempel, Karl-Marx-Stadt*
— *Hans-Jürg Kelpin, Dienstedt*
— *Franz-Peter Kurtz, Schwerin*
— *Karl Müller, Potsdam*
— *Hella Sauerbrey, Berlin*
— *Hanna Scheffs, Potsdam*
— *Herbert Scheffs, Potsdam*
— *Ruth Schonert, Hohenneuendorf*
— *Kurt Schwarz, Gera*
— *Margot Seeger, Riesa*
— *Horst Steinbrück, Annenwalde*
— *Günter Walz, Neuruppin*
— *Rudi Weiß, Zwickau*
— *Horst Wenige, Gotha*

Hella Sauerbrey

Kulturaustausch und geistige Bereicherung

Diskussionsbeitrag, gehalten auf dem III. Zentralen Treffen der Esperantisten im Oktober 1978 in Rostock

Von den Ergebnissen des IX. Kongresses des KB im vergangenen Jahr ausgehend, möchte ich einige für uns Esperantisten positive Schlußfolgerungen ziehen. Schlußfolgerungen, die sowohl jeden Einzelnen, den Kulturbund als auch unsere Gesellschaft betreffen.

Es handelt sich um die Tatsache, daß wir Esperantisten unsere Interessen und Ideale verwirklichen können und dabei gleichzeitig an der Erfüllung der grundlegenden Aufgaben des KB mitwirken. Ich möchte hier nicht alle 10 Aufgaben berühren, sondern nur auf 2 eingehen, nämlich *Kulturaustausch und geistige Bereicherung und Persönlichkeitsbildung.*

Kulturaustausch setzt friedliches Zusammenleben voraus – oder sollte man lieber umgekehrt sagen, daß friedliches Zusammenleben Kulturaustausch nach sich zieht?

Nun – wie man es auch ausdrückt, beide Begriffe gehören zusammen – sie bedingen einander.

Kulturaustausch bedarf aber eines Mittels. Das ist meistens das gesprochene oder geschriebene Wort. Wir haben uns dieses Mittels schon oft bedient. Ich glaube, hier in diesem Kreise, wo sich unsere Aktivsten zusammengefunden haben, ist keiner, der nicht schon öfter an diesem Kulturaustausch mitgewirkt oder wenigstens Hilfestellung dafür geleistet hat. Ein effektives Beispiel des Kulturaustausches mit Hilfe des gedruckten Wortes ist die Herausgabe klassischer und neuzeitlicher hummanistischer Literatur. Ich denke dabei u. a. an die Serie des estnischen Verlages „Eesti Raamat" mit „Okupacio", „Kuŝanta Tigro", „Kalevipoeg", „La mastro de Korboja" und „Estona Soveta Poezio". Ich denke auch an die DDR-Ausgaben von „Nackt unter Wölfen" und „Dreigroschenroman".

Noch viele andere wären erwähnenswert.

Und nun noch einige Bemerkungen zur geistigen Bereicherung und Persönlichkeitsbildung. Man sage nicht, ein Hobby diene nur zur Entspannung und Zerstreuung. Unbemerkt kann sich daraus geistige Bereicherung und Persönlichkeitsbildung ergeben. Das habe ich am eigenen Leibe – besser gesagt „Geiste" – erfahren.

Nichts ahnend und wollend, habe ich vor 10 Jahren mal an Esperanto genascht. Das war in einem Kursus bei Bfrd. Schonert. Dieser wohl interessanten, aber mich noch nicht packenden Kostprobe folgte dann ein pädagogisches Seminar in Ungarn. Dort, in internationaler Gesellschaft, traf mich der zündende Funke. Zurückgekehrt, begann ich mich ernsthaft und systematisch mit Esperanto und speziell mit Esperanto-Literatur zu befassen. Mein „1. Opfer" war vietnamesische Literatur. Was sich aus dieser Begegnung entwickelte, wird dem Leser von „Paco" und „der esperantist" ja bekannt sein. Also Rezensionen, Übersetzungen und schließlich das Hörspiel „Die Eheleute AFuh". Ich sehe und beurteile heute Vietnam mit ganz

anderen Augen als vor der intensiven Beschäftigung mit dieser Literatur. So hat sich mein Horizont allmählich erweitert – bei jedem neuen Buch – bei jeder Begegnung mit ausländischen und hiesigen Esperantisten hier oder im Ausland.

Die Geschichte der Kultur ist weitgehend eine Geschichte der Kontakte. Wir können mit Hilfe des Esperanto ein Kapitel hinzufügen. Nutzen wir das! Wir können damit die Friedenspolitik unseres Staates unterstützen!

Briefwechsel ist eine von vielen Möglichkeiten. Er zwingt außerdem dazu, unsere eigenen Verhältnisse und Probleme zu studieren, um den Briefpartnern erschöpfende Antworten auf ihre Fragen geben zu können. Das verhilft zu eigenen Erkenntnissen und Bekenntnissen. Wie vieles wird einem doch erst bewußt, wenn andere danach fragen und dadurch neue Denkanstöße geben.

Ich kann also abschließend behaupten, daß Esperanto mir nicht nur neue Horizonte eröffnete, sondern mich auch zu politischem Denken und Handeln angeregt hat und ständig Motor für bewußte Erkenntnisse war und ist. Diese weiterzugeben, ist mir Bedürfnis und deshalb „... mi semas kaj semas neniam laciĝas, pri l'tempoj estontaj pensante"!

Resumo: Realigante la individuajn interesojn kaj la idealojn de Esperanto. la esperantistoj kontribuas al la kulturinterŝanĝo kaj spirita evoluo de la personeco, t. e. celoj de Kulturligo. La aŭtorino montras tion ĉe la propra ekzemplo.

★

Gratulon al Hella Sauerbrey

La 10an de junio ŝi plenigis ses jardekojn, la aktiva kaj sperta membro de CLE, Hella Sauerbrey. Ŝi sukcese gvidis multajn kursojn kaj estas unu el la ĉefaj kolonoj de la Distrikta Laborrondo en Berlin. Al la jubileulino CLE tre kore gratulas kaj deziras ĉion bonan por la estonto.

CLE

Por Nuklea Malarmado

Kampanjo por Nuklea Malarmado (Campaign for Nuclear Disarmament), fondita i. a. de la fama filozofo Bertrand Russel, en sia konferenco inter la 16a kaj 18a de novembro en Londono, voĉdonis pri dokumento, laŭ kiu tiu socia movado en Britio „favoras la instruadon de Esperanto en ĉiuj lernejoj". 85 konferencanoj voĉdonis por, kaj 39 kontraŭ.

Prelego antaŭ studentoj

En la Pedagogia (universitatnivela) Altlernejo „Lieselotte Herrmann" en Güstrow, antaŭ studentoj de ĝermanistiko (slavistiko) la 9an de novembro 1979 prelegis s-ro Hans Buth pri „Planlingvaj projektoj kaj la planlingvo Esperanto". La prelego renkontis tre fortan intereson kaj estos ripetata en la jaro 1980.

LEGU KAJ LERNU! - Lies und lerne!

En tiu ĉi jaro okazos en Moskvo la Olimpiaj ludoj. Tial legu hodiaŭ ion interesan pri sporto.

Ĉu vi jam iam pensis pri tio kio okazus, se ...

... naĝisto dum konkurso perdus sian bankalsonon?

Tio okazis foje en Rostock dum GDR-ĉampionado. Dum finalo de 1500-metra rapidnaĝo unu el la sportistoj perdis sian bankalsonon tuj post la starto. Sed li ne ĉesis naĝi. En la rezulto-listo oni anoncis lin je la dua loko. Tamen tio ne estis ĝusta. Laŭ la reguloj de FINA (Internacia Amatora Naĝista Federacio) la naĝisto devas esti vestita per bankalsono. Se li perdas ĝin, oni devas lin eskludi.

... dum boksmatĉo estingiĝus la lampoj en la ringo?

Ankaŭ tio jam okazis. Dum bokskonkurso inter GDR kaj Finnlando. La matĉo de malpeza kategorio estis en la dua rundo. Subite la lampoj estingiĝis pro teknika difekto. Oni ĉesigis la matĉon. Poste oni anoncis, ke la finna boksisto venkis laŭ poentoj. Ĉu tio estis en ordo? Jes, ĉar laŭ la reguloj oni devas ripeti la matĉon nur, se io simila okazas en la unua rundo. Alie estas, se tio okazas en la dua aŭ tria rundo. Tiam venkas tiu, kiu ĝis tiu momento akiris pli multe da poentoj.

Sporto estas unu el tiuj amasmovadoj, kiuj havas plej multe da internaciaj rilatoj. Tio signifas, ke ankaŭ la sportistoj bezonas komunan lingvon. Hodiaŭ ni prezentis al vi kelkajn sportajn fakterminojn.

Klarigoj

Olimpiaj ludoj	– auch: Olimpikoj, Olympische Spiele;
naĝi	– schwimmen, (naĝisto = Schwimmer);
ĉampionado	– Meisterschaft;
finalo	– Finale;
rapidnaĝo	– Freistilschwimmen, andere Schwimmdisziplinen heißen in Esperanto: brustonaĝo, papilinaĝo, dorsonaĝo, miksonaĝo;
starto	– Start;
rezultolisto	– Ergebnisliste (rezulto + listo);
regulo	– Regel;
FINA	– Internationaler Amateur Schwimmverband;
eskludi	– disqualifizieren;
boksmatĉo	– Boxwettkampf (bokso + matĉo);
ringo	– (Box) Ring;
rundo	– Runde (beim Boxen);
malpeza kategorio	– Leichtgewicht;
difekto	– Schaden, Beschädigung;
ĉesigi	– beenden;
poento	– Punkt (beim Sport);
amasmovado	– Massenbewegung (amaso + movado);
faktermino	– Fachausdruck (fako + termino)

Internaciaj Esperantistaj Ferioj ĉe Berlin

La aranĝo okazonta de la 15a ĝis la 27a de septembro 1980 ĉe la lago „Krossinsee“ proksime de Berlin, jam estis anoncita en „der esperantist“ n-ro 1/1980, p. 10.

Nun ni volas sciigi plurajn detalojn:

La partoprenontoj de la internacia renkontiĝo loĝos en malgrandaj domoj, kiuj troviĝas sur la tereno de la kampadejo „Intercamping“, ĉirkaŭataj de arbaro, rekte ĉe la bordo de la lago. En ĉiu dometo estas 4 ĉambroj kun po 3 litoj. La ĉambroj estas moderne ekipitaj. La Ferioj pasas en du etapoj:

1. Dum la unua semajno (de la 15a ĝis la 20a de septembro) la aranĝo pasos laŭ plano (t. e.: antaŭtagmeze lecionoj por lingva perfektiĝo, prelegoj, seminarioj k. t. p., posttagmeze komunaj migradoj, ekskursoj aŭ banado).
2. La duan semajnon la partoprenontoj travivu tute laŭvole.

La partoprenkotizoj sumiĝas je

200 markoj por GDR-anoj / 250 markoj por eksterlandanoj.

Tiuj kotizoj kovros

13fojan tranoktadon / 5fojan tagmanĝadon (16a ĝis 20a de septembro) kaj kostojn por laŭplanaj aranĝoj (16a ĝis 20a de septembro).

La partoprenantoj mem devas zorgi pri la maten- kaj vespermanĝaĵoj dum la tuta restado en la kampadejo kaj krome ankaŭ por la tagmanĝaĵoj dum la dua semajno (21a ĝis 27a de septembro).

Sur la tereno de „Intercamping“ ekzistas rekomendinda restoracio, kie oni bonpreze povas tagmanĝi, kaj krome vendejo, kie oni povas aĉeti la ĉiutage bezonatajn aĵojn inkluzive nutraĵojn.

La nombro de la disponeblaj litoj estas limigita!

Petu senprokraste (limdato: 30a de junio 1980) aliĝilon kaj precizan programon de Kulturligo de GDR, Distrikta Laborrondo Esperanto/Berlin, GDR-102-Berlin, Breite Straße 35—36.

Interesataj poŝtrevene ricevos aliĝformularon, kiu estu resendita nepre ĝis la 31a de julio 1980 al la supre nomita adreso. Ĝis la sama limtago oni transpagu la partoprenkotizojn al:

Poŝta ĉek-konto Berlin 487 40 ĉe Bezirksarbeitskreis Esperanto/Berlin im Kulturbund der DDR.

★

Korekto pri KEA

En „der esperantist“ 5/79 ni publikigis intervjuon kun s-ro René Valdés pri la nove fondita Kuba Esperanto-Asocio. Bedaŭrinde ni forgesis indiki, ke s-ro Valdés estas vicprezidanto de KEA. Ankaŭ ni skribis erare pri „Asocio de Kubaj Esperantistoj“.

Devas esti „Kuba Esperanto-Asocio“ (KEA).

Ni pardonpetas pro la eraroj.

Jen ni konatigos al vi la nacian estraron de KEA:

— Andrés Rodriguez — prezidanto
— René Valdés — vicprezidanto
— Serafin Marrero — sekretario pri publikaj kaj internaciaj rilatoj
— Rufino López — sekretario pri organizado
— Barbara Oña — sekretariino pri kulturo
— Julio Martinez — sekretario pri edukado
— Fernando Paredes — sekretario pri financo
— Roberto Gutrie — sekretario pri propagando.

Rezolucio de la MEM-kunveno en Lucern

La partoprenantoj:

1. — aprobas la raporton de la prezidanto kaj ĝenerala sekretario kun la programplano, deklaro de Monda Packonsilantaro kaj MEM k. t. p.
2. — apelacias al la esperantistaro subteni la agadon de MPK.
3. — solidariĝas kun la oficiala dokumento de UN iniciatita de Pola Popola Respubliko pri la edukado de la socioj en la spirito de la paco.

Por la kunveninto: N. Aleksiev

CLE-reprezentanto en Packonsilantaro

En la jaro 1974 la Packonsilantaro de GDR esprimis la deziron, ke aniĝu al ĝi reprezentanto de Centra Laborrondo Esperanto. Rudi Graetz, la forpasinta prezidanto de CLE transprenis tiun honoran taskon.

Evidentė la intereso de la Packonsilantaro devenas i. a. de la bonegaj rilatoj inter MEM kaj la Tutmonda Packonsilantaro. Post la forpaso de Rudi Graetz dum 2 jaroj la loko vakis. Fine de 1979 la Prezidio de Kulturligo proponis, ke d-ro Detlev Blanke, sekretario de CLE, transprenu tiun funkcion, kiu akceptis tiun honorigan taskon.

2. Interlinguistik-Seminar verschoben

Das 2. Interlinguistik-Seminar, zu dem Wissenschaftler aus Akademien und Hochschulen der DDR eingeladen werden, findet nicht, wie in „der esperantist“ 6/79 berichtet, vom 24. — 27. Juni 1980 in Miersdorf statt. Aus technischen Gründen macht sich eine Verschiebung erforderlich. Die Wissenschaftler treffen sich vom 18. — 22. November 1980 in Ahrenshoop.

Sind Sie bereits Mitglied des Kulturbundes?

Sie sind aber Esperantist! Darum sollten Sie auch Mitglied des Kulturbundes der DDR sein. Er ist **unsere** Organisation, die uns alle Möglichkeiten vielseitigen Wirkens bietet und die Arbeit der Esperantisten unterstützt und fördert.

Der Vorsitzende Ihrer Kreisarbeitsgruppe Esperanto oder Ihr Kursusleiter wird Ihnen gern Aufnahmeanträge aushändigen.

N. Aleksiev — laŭreato de la Fuĉik-medalo

Pro siaj grandaj meritoj por ĵurnalismo Nikola Aleksiev fariĝis laŭreato de la honormedalo „Julius Fuĉik“ de la Internacia Organizaĵo de Ĵurnalistoj (Prago). Entute tiun medalon en Bulgario nur portas 4 personoj. Do tre rara kaj alta distingo. CLE kore gratulas.

Ni kore gratulas

— al prof. Paul Ariste el Tallinn, kiu festis sian 75an naskiĝtagon je la 3a de februaro 1980

— al Henrik Seppik, konata aŭtoro de lernolibroj kaj gramatikoj, el Sovetunio, kiu fariĝis 75-jara la 9an de februaro 1980

— al d-ro med. sc. Peter Ruff, membro de CLE, kiu komence de 1980 fariĝis doktoro de medicinaj sciencoj.

El eksterlando

Esperanto en Samarkando

Ekde septembro 1979 en la plej granda mezlernejo de Samarkand (Uzbekistano) ekfunkciis fakultativa Esperanto-kurso por 35 lernejanoj. Ĝin gvidas instruistino G. I. Šarjukova. Kuraĝigaj salutleteroj estas atendataj el la tuta mondo. Krome la kurso volonte starigus amikajn ligojn kun ĉiuj similaj E-kolektivoj.

Ĉion bv. direkti al la adreso: Šarjukova Galina Ismailovna (por Esperanto-Fakultativo), SU-703 048 Samarkando, ul. A. Ikramova 44, Srednjaja Škola N 29, Uzbekistano/SU. Respondo certa! Do, skribu amase!

Bruno Migliorini en kaj pri Esperanto

Kelkaj italaj esperantistoj laboras por eldoni la kompletan verkaron de Bruno Migliorini en kaj pri Esperanto.

Surbaze de la jus aperinta bibliografio de la verkoj de Migliorini oni jam kolektis multajn tekstojn kaj nun oni trastudas ilin por aranĝi ilin eldonpretaj.

Tial ke oni havas la impreson ke en la aperinta kompleta bibliografio tamen mankas indikoj pri artikoloj publikigitaj en ne-italaj Esperanto-revuoj, oni alvokas ĉiujn esperantistojn, kiuj konas verkojn de Bruno Migliorini en ne-italaj Esperanto-revuoj, sendi informon pri ili al la kunordiganto de la itala laborgrupo: Silvio Stoppoloni, Via Guerrazzi 18, I-51100 Pistoia, Italujo.

Kursoj de Esperanto en Kubo

Septembre komencis en Havano du E-kursoj por laboristoj kaj studentoj; unu el la du estas Enkonduka Kurso kiu konsistas el 10 lecionoj kaj partoprenas ĝin ĉirkaŭ 900 gelernantoj, kaj la alia estas Meznivela Kurso kiu konsistas el 16 lecionoj kaj partoprenas ĝin ĉirkaŭ 120 gelernantoj. Multe helpas al la gelernantoj kaj ankaŭ al la instruistoj la lecionaroj eldonitaj de nia Asocio. Po unu horo ĉiusemajne, ĝi daŭris ĝis decembro 79. La lernantaro estas entuziasma kaj dank' al la sperto de la antaŭaj kursoj, la nunaj kursoj estos nepre plena sukceso.

IVa Esperantista Festivalo en ČSSR

Ĝin la Esperanto-Rondeto de Uzina Klubo Ostroj Opava organizas honore al la 35a datreveno de liberigo de Ĉehoslovakio far Soveta Armeo.

La festivalo okazas en la tagoj 12. — 15. de septembro 1980 en la urbo Opava — enkadre de la XXIIa kultursemajno „Opava de Bezruč". Ĉefaj aranĝoj de la IVa Esperantista Kultura Festivalo: Internacia fotokonkurso „La mondo de paco kaj amikeco ĉirkaŭ ni". La **limdato por konkursaĵoj: 30. 5. 1980.** Pluajn informojn vidu apude / Deklama kaj kantista konkurso kun internacia partopreno „La muziko kaj poezio". Fakoj: 1. Poeziaĵoj, 2. Kantoj kaj operarioj / Arta vespero — Interkona vespero — Solena kunsido / Kunvenoj kaj renkontiĝoj de la sekcioj de Ĉeha Esp. Asocio / Ekskurso en ĉirkaŭaĵon de la urbo Opava, vizito de memorindaĵo.

Loĝiga servo: La aranĝantoj de la IVa EKF enloĝigos interesulojn, kiuj aliĝos antaŭ la 20a de aŭgusto 1980.

Partoprenkotizo: Eksterlandanoj pagos laŭ apartaj kondiĉoj. Studentoj havos rabaton.

Pluajn informojn kaj aliĝilojn liveras la Organiza Komitato: ZK Ostroj — Esp. rondeto, Na rybníčku 41, 746 01 Opava 1, ČSSR.

Kondiĉoj por la fotokonkurso:

1. En la konkurson oni akceptas nigroblankajn kaj kolorajn fotografaĵojn ekde la formato 18 × 24 cm ĝis 30 × 40 cm.
2. Ĉiu konkursaĵo devas havi titolon de la fotografaĵo(j), nomon kaj adreson de la aŭtoro.
3. La konkurson rajtas partopreni esperantistoj — membroj de landaj Esperanto-Asocioj. La koncerna konfirmilo estu almetita al la konkursaĵoj.
4. Ĉiu partoprenanto de la konkurso rajtas sendi maksimume 10 fotografaĵojn.
5. La konkursaĵojn prijuĝos faka jurio, kiu premios la plej bonajn konkursaĵojn.
6. En la konkurso oni atribuos tri objektajn premiojn kaj plurajn premiojn honorajn. La jurio rajtas la premiojn disdividi, eventuale kunigi.
7. El la konkursaĵoj oni aranĝos ekspozicion en kadro de la IVa EKF en Opava, eventuale en pluaj lokoj en ČSSR.
8. La limdato por sendi la konkursaĵojn estas 30. 5. 1980. Validas dato de la poŝta stampo.
9. La nepremiitaj konkursaĵoj estos post la ekspozicio resendotaj al la aŭtoroj.
10. La fotografaĵojn por la konkurso sendu al adreso de la organizantoj.

Anonco el Velingrad

de la tradiciaj internaciaj esperantistaj amasaj aranĝoj:

II-a Internacia Esperantista Turista Renkonto, 15. — 25. 5. 1980

V-a Internacia Esperantista Seminario-Ferio, 18. — 30. 9. 1980

Venu por ĝui neforgeseblan internacian esperantistan etoson!

Vin certe ravos pitoreske belaj montaroj: Rodopi, Rila, Pirin, sanefiko de freŝa pinaero, kuracaj varmaj mineralakvoj en banejoj kaj plaĝo, brilanta suda suno kaj konata bulgara gastameco!

Limdato por aliĝo: 15. 4. kaj 1. 8. 1980

Por detalaĵoj turnu vin al adreso: Bulgario, 4600 Velingrad, P.K. 7, Esperanto societo.

En Jalta pionirpalaco

Sur suda bordo de duoninsulo Krimeo ĉe la Nigra Maro situas belega, mondfama kuracloko Jalta multnombre vizitata de enlandaj kaj eksterlandaj gastoj. Tial Klubo de Internacia Amikeco ĉe Jalta pionirpalaco havas favorajn eblecojn por interesa laboro renkontiĝo kun aliaj urbaj, aliaj respublikaj kaj eksterlandaj gastoj.

Dum la lastaj jaroj ni havis la plezuron akcepti gastojn el diversaj landoj. Bedaŭrinde plimulto el niaj gastoj ne posedis rusan lingvon aŭ Esperanton kaj ni bezonis helpon de tradukistoj. Tamen samtempe ĉi renkontiĝoj konvinkadis niajn gastojn kaj pionirojn je utileco de internacia helplingvo Esperanto. Kaj kelkajn jarojn ĉe la pionirpalaco funkcias studrondeto de Esperanto kion mi gvidas.

Ekzistas ankaŭ dum ĉi lernojaro Esperanto-rondeto vizitata de 11—14jaraĝuloj kaj ni grandplezure akceptos leterojn de samaĝulaj gesamideanoj el ĉiuj landoj. Memoru, ke eblas nek nur interkorespondado.

Je 12 km de Jalta situas mondfama, internacia kuracloko por infana tendaro „Artek" kaj Internacia junulara tendaro „Sputnik", kaj Jalton vizitadas multmiloj da eksterlandaj feriantoj. Sekve eblas, ke vi mem, viaj parencoj aŭ gekonatuloj iam vizitos nin. Bonvenon por viaj leteroj kaj des pli por vi persone! Nia adreso estas Sovetunio 334 200 Jalta, Čeĥova 11, Dom pionerov „Esperanto.

Esperanto kursgvidanto
Miĥail Cimberov

Verkaĵojn kaj nigrablankajn grafikaĵojn

de 12 — 16-jaraj lernejanoj kolektas Rostova E-klubo „Amikeco" por organizi ekspozicio(j)n kaj serio(j)n da artikoloj en junulara(j) ĵurnalo(j), lernejoj k. t. p.

Estas jenaj temoj:

A. Omaĝe al la 110-jara datreveno de Lenin-naskiĝo (22. 4. 80)

Oni konsideru jenajn temojn: 1. Lenin vivos ĉiam. 2. Nia lando marŝas laŭ la vojo de Lenin. 3. Nia forto — amikeco (pri amikeco kun USSR). 4. Sovetunio — la lando de Lenin.

B. Omaĝe al la tago de pioniroj (19. 5. 80) 1. Nia pionira taĉmento. 2. Pioniroj-herooj. 3. Sovetaj pioniroj — niaj amikoj. 4. Al kiu pioniro mi volus simili.

C. Omaĝe al la internacia tago de la infanoj (1. 6. 80)
1. Kiel kaj kiaj mi edukos miajn infanojn. 2. La plej interesa okazintaĵo en mia vivo. 3. Pri kio mi okupiĝas en mia libera tempo. 4. Pri kio en mia patrio mi pleje fieras. 5. Mia plej ŝatata libro kaj ĝiaj herooj.

Rekomendoj:

1. La verkoj estu en Esperanto aŭ en la rusa (eblas, ke ni ricevu tradukon faritan de instruisto).

2. Bonvenas aliaj (krom la menciitaj) temoj similspiritaj.

3. Kreaĵoj pri temoj daŭre aktualaj estas bonvenaj ankaŭ post la indikitaj datoj.

4. La plej aktivaj partoprenantoj ricevos premiojn.

Oni sendu la kontribuojn al la adreso: A. S. Melnikov, SU-344 007 Rostov-Don-7, pk. 393, Sovetunio.

„Internacia ĵurnalisto"

Interesan bultenon eldonas la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA). „Internacia Ĵurnalisto" jam aperas en la 17a jaro kaj enhavas abundon da interesaj informoj pri ĵurnalisma peresperanta agado. La bulteno, 14paĝa, aperas 3 foje jare kaj estas redaktata de la tri bulgaraj ĵurnalistoj Ivan Keremidĉiev-Esperov (ĉefredaktoro), Krastju Karucin kaj Minko Conkovski (redaktoroj).

Numero 2/1979 (strange, la jaron oni forgesis indiki) enhavas artikolojn i. a. pri TEĴA, pri la letero de Tolstoj koncerne Esperanton, pri ASE, la Olimpiaj Ludoj 1980 en Moskvo, k. s.

Interesiĝantoj skribu al la ĉefredaktoro Ivan Keremidĉiev-Esperov, blv. Hristo Botev 98, Sofio.

Ne hezitu prelegi

Kelkfoje oni aŭdas la opinion, ke oni ne prelegu pri Esperanto, ĉar ne eblas kontentigi eventualan bezonon je kurso, ĉar aŭ mankas taŭga instruisto aŭ lerniloj. Tio estas plene erara opinio. Esperanto estas kultura faktoro, pri kiu oni devas informi seninterrompe ĉiam tie, kie ekzistas bonaj kondiĉoj aŭ bezono. Prelego ne nepre devas tuj sekvigi kurson. Gravas, ke ĝi helpas forigi miskonceptojn kaj gajnas simpatiulojn. Eventualajn lernemulojn oni povas noti kaj, se ekestos ebleco, al ili oferti korespondan kurson. Iam povus maturiĝi la cirkonstancoj ankaŭ por kurso. Cetere, ekzistas multaj ekzemploj por tio, ke aŭskultinto de prelego mem alproprigis al si la lingvon kaj ... poste instruis Esperanton en kurso. Do, ne hezitu prelegi!

INFORMOJ EL GDR

Pentraĵo pri Otto Bäßler

„La laborista veterano Otto Bäßler" estas la titolo de pentraĵo de Inge Wunderlich (60,5 × 56 cm, miksteknike), ekspoziciita dum la 10-a distrikta artaĵo-ekspozicio en Leipzig. La bildo estas proprajo de la Muzeo por Historio de Leipzig.
Otto Bäßler estas membro de Centra Laborrondo, apartenas al ties fondintoj kaj apartenas al la plej elstaraj aktivuloj de la internacia laborista Esperanto-movado de la 20aj jaroj.

Sonbenda gvidilo tra la Händel-domo

La membroj de la Subdistrikta Laborrondo Halle, sub la gvido de ĝia prezidanto August Grosch, pretigis sonbendan gvidilon pri la ekspozicioj de la Händel-domo en Halle. Esperantistoj el la eksterlando tiel povas konatiĝi kun la vivo de la eminenta komponisto ankaŭ pere de la internacia lingvo.

Trouzita metaforo

Ke ankaŭ Esperanto jam fariĝis metaforo por ĉio ajn, estas konate. Antaŭ multaj jaroj oni povis ie legi pri „Esperanto de la imperiismo", kaj celis diri, ke imperiistoj serĉas mensogolingvon por subfosi la socialisman socion. Pli pozitiva estis la „Esperanto de la radiokomunikistoj" (en „Neues Deutschland", 16./17. julio 1977), ĉar temis pri internacie konvenciitaj signaloj.
Tamen, finfine ni scias, kio Esperanto vere estas. En „Neue Berliner Zeitung" n-ro 19/1979 en artikolo traktanta la negativan influon de okcidentlandaj amasmedioj je la psiko de la infanoj, la bildstrioj (Comics) titoliĝis „Esperanto de la analfabetoj". Ni rezignas pri komento.
Finfine ankaŭ „Lausitzer Rundschau" (2. 11. 1979) ion eksciis pri Esperanto kaj jen saĝe skribas „La komerca Kanto estas internacie komprenebla, ĉar ne postulas prudenton. Ĝi estas iuspeca muzika Esperanto".
Do, nun finfine, ĉio estas klara.

Multflanka kaj tre stabila agado

La Distrikta Laborrondo Esperanto en Neubrandenburg, sub la gvidado de Werner Pfennig, membro de la prezidio de CLE, sendube apartenas al la plej kontinue kaj multflanke laborantaj en GDR. La neubrandenburganoj klopodas forlasi stereotipajn aranĝoformojn kreante variecon kaj multflankecon por tiel kontentigi la interesojn de kiom eble plej multaj membroj, kaj ili sukcesas.

La laboro estas longe kaj precize planata, la taskoj disdonitaj. Ekzemple en la jaro 1979 okazis jenaj aranĝoj: 1. la 9-a esperantista distrikta renkontiĝo (kun gastoj el Koszalin, Pollando). 2. la 2-a Somera Esperantista Familia Tendaro (SEFT) en la lago kaj arbaroriĉa regiono de Feldberg (kp. „der esperantist" 6/1979, n-ro 98, p. 2). 3. 2 semajnfinaj seminarioj por pliklerigado de komencantoj kaj progresintoj. 4. la 5-a distrikta junulara esperantista konferenco (kun gastoj el Razgrad/Bulgario).

Krome oni organizis 3 kursojn por komencantoj, havis unu kurson en la Popola Altlernejo, 4 konversaciajn kursojn kaj krome unu korespondan kurson.

DLE tenas jam tradiciajn rilatojn al Koszalin en Pollando kaj iniciatis la eknodon de novaj amikecaj rilatoj al la ĝemelaj urboj Mladá Boleslav/ČSSR, Miskolc/Hungario kaj Razgrad/Bulgario. DLE eldonas regule germanan informmaterialon por la gazetaro kaj (parte en Esperanto) por siaj membroj.

Ne estas miriinde, ke relative ofte raportas la loka kaj distrikta gazetaro kaj la radiostacio pri Esperanto en la distrikto Neubrandenburg.

Recenzoj

„Budapeŝta Informilo“ — mirinde multflanka

Subtitole ĝi oficiale nomiĝas „Esperantlingva monata oficiala informilo de la Budapeŝta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio“. Sed kio ĝi vere estas? Tion montru trarigardo de la jarkolekto 1978. Inter multaj legindaj primovadaj artikoloj estu menciataj: „Esperanto, ĉu lingvo de sekto aŭ lingvo internacia?“ (A. Münnich) kaj ampleksa diskuto pri la temo „Kiu estas sekta kaj kiu estas moderna esperantisto?“, „Kiel trarompi el la ‚magia cirklo'?“ kaj „Kelkaj bazaj ideoj pri la 5-landa agado“ (G. Kurucz), „Pensoj pri la celhava ŝanĝo de la strukturo de la Akademio de Esperanto“ (O. Haszpra), „D-ro Zamenhof kaj Lingwe Uniwersala“ (B. Golden), „Aurél Stromfeld, la esperantisto“ (A. Rátkai), la parolado de la ĉefdirektoro de UNESKO dum UK en Rejkjaviko, la novjara mesaĝo de H. Tonkin, ampleksaj raportoj kaj informoj pri la UK en Varna, la TEO-kongreso en V. Tarnovo kaj kompreneble pri la Hungarlanda Esperantokongreso. Impresas ankaŭ la artikoloj pri la hungarlanda Esperanto-gazetaro (O. Haszpra), pri la hungarlanda libroeldonado (V. Benczik) kaj pri la mirinde granda librooferto de la libroservo de HEA (ĉ. 100 titoloj!). Inter la politikaj temoj menciindas ekzemple „La 10-a de decembro, la Tago de la Homaj Rajtoj“ (G. Ferencz). Pri la vigla grupa vivo en Budapeŝto kaj la tuta lando ĉiumonate raportas multaj paĝoj, i.a. pri la aktivado de la Medicina Esperanto-fakgrupo kaj pri la 100-a! Scienca Vespero de la grupo „Konkordo“. La konstanta Scienca Rubriko i.a. amplekse raportas pri la Interlingvistika Konferenco en Budapeŝto, pri la seminario „Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko“ en Žilina kaj pri la seminario „Sciencaj aspektoj de Esperanto“ en Ahrenshoop (resumo de kelkaj prelegoj).
Aliaj konstantaj rubrikoj temas pri „Esperantisto de la monato“ kaj „Aŭtoro de la monato“. „Tra la mondo“, ampleksaj informoj pri turismaj kaj aliaj movadaj aranĝoj, komenco de ŝakokurso kaj koresponddeziroj kompletigas la varian enhavon de tiu ne nur budapeŝta, ne nur hungarlanda, sed jam internacia Esperanto-informilo, legenda de ĉiu iom serioza esperantisto. Abonebla ĉe CLE = 10 markoj.

D. Dungert

„STARTO“

Ĉiu esperantisto havas intereson ekscii ion pri la Esperanto-movado en aliaj, ĉefe en najbaraj landoj. La asociaj organoj, aperantaj en la unuopaj landoj, eble plej bone povas kontentigi tian scivolemon. Al ĉiu, kiu havas amikajn rilatojn al grupoj aŭ unuopuloj en Ĉeĥoslovakio mi volas rekomendi legi la organon de la Ĉeĥa Esperanto Asocio „Starto“, aperanta 6-foje dum la jaro kaj abonebla ĉe CLE. Ĝia lingva nivelo estas bonega, oni trovas preskaŭ nenion riproĉindan.
„Starto“ informas ne nur pri la Esperanto-movado en la diversaj lokoj de la lando, sed konatigas la legantojn ankaŭ kun la internacia Esperanto-movado au per mallongaj informoj aŭ per pli ampleksaj artikoloj. Krom tio ĝi pritraktas multajn aliajn interesajn temojn. Gi prezentas la laboron de diversaj sekcioj, ekzemple de la sciencteknika, fervojista kaj aliaj sekcioj. Speciale interesaj estas la artikoloj pri lingvaj demandoj. Io simila bedaŭrinde mankas en „der esperantist“. Oni trovas en gi ankaŭ poemojn, kantojn kaj aliajn beletraĵojn. „Starto“ estas vere varia laŭ enhavo kaj strebas prezenti ion por ĉies gusto. Ekzemple oni trovis en ĉiu numero de la jaro 1978 aldone serion de artikoloj „Dek-du ĉapitroj pri la sindefendo“. Kiel preskaŭ ĉiu asócia organo ankaŭ „Starto“ enhavas de tempo al tempo artikolojn en ĉeĥa lingvo. Sed ili estas malmultaj kaj ne ĝenas la leganton, ne scianta la ĉeĥan.
Tio, kio ne plaĉas al mi, estas la troa reklamo: en la jarkolekto 1978 ĝi okupis eĉ 58 paĝojn el 144, tio estas proksimume 40 %. Por la abonantoj estus certe pli utile, se oni uzus tiun spacon por publikigi pliajn interesajn artikolojn.
En la lastaj jaroj „Starto“ kelkfoje ŝanĝis sian eksteran aspekton, sed ĉiam nur por plibeliĝi. En la jaro 1978 ĝi festis la 10-jaran jubileon de sia aperado. Kaj por la venontaj jaroj mi deziras al gi daŭran prosperadon, plibonigon de enhavo kaj aspekto kaj multajn novajn legantojn. Abonebla ĉe CLE: 10 markoj.

Dieter Berndt

En la refera servo pri filozofio

La centrejo por informado kaj dokumentado pri filozofio ĉe la Akademio de Sciencoj de GDR en Berlin eldonas serion de referaĵoj pri artikoloj aperintaj en plej diversaj revuoj.
En serio D, 7 (1974), p. 17, d-ro K. Krüger referis artikolon de I. Kulagin pri „Konferenco en Moskvo pri lingvo de internacia komunikado“ el „Hungara Vivo“ 2/1973, p. 22.
En n-ro 9 (1976), p. 12, la sama referinto komunikas la enhavon de la artikolo „Lingvo kaj socio“ de Ferenc Fabricius-Kovács el „Hungara Vivo“ 2/1974, p. 21 kaj sur paĝo 15 tiun de Istvan Szerdahelyi „Esperanto en la spegulo de la moderna lingvoscienco“ (HV 1/1979, p. 10 ĝis 11).
La tri ekzemploj montras vojon sekvindan.

60 Internaciaj Esperanto-aranĝoj en 1980

Signifo de la mallongigoj uzataj en la kalendaro:

N: Nomo de la aranĝo
T: Temo de la aranĝo
O: Organizanto
K: Korespondadreso
P: Prezo
R: Rimarkoj
A: Aliĝdato
M: Maksimuma nombro de partoprenantoj
JA: Junulara aranĝo

1. junio 1. — 8. Ustronie Morskie/Pollando
N: V. Cebalta Esperanto-Printempo kaj seminario por tradukistoj
OK: Filio de PEA en Koszalin, pk. 30, PL 75-950 Koszalin
P: 120 rbl. aŭ 360 GDR-mk A: 30. 4. 1980 M: 100

2. junio 1. — 14. Smoljan/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 1. 5. 1980 M: 200

3. junio 1. — 14. Varna/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj ĉe la maro
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 1. 5. 1980 M: 150

4. junio 1. — 14. Velingrad/Bulgario
N: Internacia Turista Renkonto tra Montoj kaj Valoj
O: Monda Turismo kaj loka Esperanto-societo
K: Manol Colev, Br. Krastini, 14, BG 4600 Velingrad A: 1. 5. 1980 M: 40

5. junio 8. — 15. Bydgoszcz/Pollando
N: Internaciaj Esperanto-Kursoj laŭ UEA-programo
OK: Filio de PEA en Bydgoszcz, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz
P: 100 rbl. au 300 GDR-mk A: 10. 5. 1980 M: 100

6. junio 15. — 22. Badacsony/Hungario
N: Mezlerneja Ripoztendaro (MER)
OK: Junulara Komisiono de HEA, Budapest, Pf. 193, H-1368 M: 300

7. junio 15. — 22. Bydgoszcz/Pollando
N: Internaciaj Esperanto-Kursoj laŭ UEA-programo
OK: Filio de PEA en Bydgoszcz, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz
P: 100 rbl. aŭ 300 GDR-mk A: 15. 5. 1980 M: 100

8. junio 16. — 27. Miedzyzdroje/Pollando
N: VII. Internacia Esperanto-Feriado
O: Turisma Oficejo „Gromada“ kaj Filio de PEA en Szczecin
K: „Gromada“, Pl. Lotników 7, PL 70-414 Szczecin
P: 230 rbl. aŭ 690 GDR-mk A: 15. 5. 1980 M: 80

9. junio 16. — 29. Smoljan/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 15. 5. 1980 M: 200

10. junio 16. — 29. Varna/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj ĉe la maro
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 15. 5. 1980 M: 150

11. junio 22. — 29. Bydgoszcz/Pollando
N: Internaciaj Esperanto-Kursoj laŭ UEA-programo
OK: Filio de PEA en Bydgoszcz, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz
P: 100 rbl. aŭ 300 GDR-mk A: 20. 5. 1980 M: 100

12. junio 27. — 29. Prešov/Ĉehoslovakio
N: 8-a Kongreso de AESSR
O: Orientslovakia Regiona Komitato de AESSR kaj Esperanto-grupo en Prešov
K: d-ro Andrej Lukáč, str. Pištejiho 27, CS 080 01 Prešov M: 250

13. junio 29. — julio 6. Bydgoszcz/Pollando
N: Internaciaj Esperanto-Kursoj laŭ UEA-programo
OK: Filio de PEA en Bydgoszcz, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz
P: 100 rbl. aŭ 300 GDR-mk A: 31. 5. 1980 M: 100

14. junio 29. — julio 12. Lančov/Ĉehoslovakio
N: XXVII. Somera Esperanto-Tendaro (SET), 1-a etapo
OK: ČEA, Jilská 10, CS 110 00 Praha
P: 1150 čs. kronoj, infanoj 600 čs. kronoj

15. junio 29. — julio 18. Mezötur/Hungario
N: 2-a Mezotura Internacia Esperanta Laborkampado (MIEL)
OK: Esperanto-Grupo „Baghy Gyula“, Mezötur, Petöfi u. 5, H-5400 M: 250

16. julio, Krakovo/Pollando
N: 3-a Internacia Laborbrigado de Esperanto-Junularo (ILEJ)
T: rekonstruado de krakovaj antikvajoj
OK: Pola Esperanto-Junularo, str. Jasna 6, PL 00-013 Warszawa
R: preciza dato fiksota A: 15. 5. 1980 M: 40 JA

17. julio, Zánka/Hungario
N: 13-a Pionira Internacia Tendaro (PIT)
OK: Teritoria Komitato de HEA, Pécs, Pf. 2, H-7601
R: preciza dato fiksota M: 220 JA

18. julio 1. — 14. Smoljan/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj por lernejanoj 10—14j.
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 1. 5. 1980 M: 200 JA

19. julio 6. — 12. Gyula/Hungario
N: 18-a Somera Esperanto-Universitato (SEU)
OK: Konsilantaro de SEU Gyula, 48-as u. 11, H-5700 M: 200

20. julio 6. — 13. Bydgoszcz/Pollando
N: Internaciaj Esperanto-Kursoj laŭ UEA-programo
OK: Filio de PEA en Bydgoszcz, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz
P: 100 rbl. aŭ 300 GDR-mk A: 31. 5. 1980 M: 100

21. julio 7. — 25. Bialistoko/Pollando
N: 1-a Internacia Junulara Esperanto-Laborbrigado
OK: Filio de PEA en Bialistoko, pk. 67, PL 15-950 Bialystok A: 31. 5. 1980 M: 35 JA

22. julio 12. — 25. Košické Hámre/Cehoslovakio
N: Somera Esperanto-Lernejo en Košice (SELKO-80)
O: Orientslovakia Regiona Komitato de AESSR kaj Esperanto-Klubo en Košice
K: Esperanto-Klubo, Dom Umenia (d-ro E. Erby), CS 041 23 Košice M: 100

23. julio 13. — 20. Bydgoszcz/Pollando
N: Internaciaj Esperanto-Kursoj laŭ UEA-programo
OK: Filio de PEA en Bydgoszcz, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz
P: 100 rbl. aŭ 300 GDR-mk A: 15. 6. 1980 M: 100

24. julio 13. — 26. Lanĉov/Ĉehoslovakio
N: XXVII. Somera Esperanto-Tendaro (SET), 2-a etapo
OK: ČEA, Jilska 10, CS 110 00 Praha
P: 1150 ĉs. kronoj, infanoj ĝis 10j. 600 ĉs. kronoj

25. julio 14. — 20. Szombathely/Hungario
N: 2-a Renkonto de Esperantistaj Familioj (REF)
OK: Csiszár, Ernö, Várpalota, Kulich Gy. u. 25, H-8100 M: 100

26. julio 14. — 23. Abaliget-Pécs/Hungario
N: 13-a Internacia Renkonto Naturamika (IREN)
OK: Teritoria Komitato de HEA, Pécs, Pf. 2, H-7601 M: 120

27. julio 16. — 29. Smoljan/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj por lernejanoj 15—18j.
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 15. 6. 1980 M: 200

28. julio 20. — aŭgusto 1. Funka/Pollando
N: Internacia Infana Esperanto-Vilaĝo
OK: Filio de PEA en Bydgoszcz, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz
P: 125 rbl. aŭ 375 GDR-mk A: 20. 6. 1980 M: 180 JA

29. julio 25. — 31. Slovaka Paradizo/Cehoslovakio
N: Turisma Semajno en Slovaka Paradizo (TUSE-80)
O: Orientslovakia Regiona Komitato de AESSR kaj Esperanto-Klubo en Spiŝská Nová Ves
K: Peter Pavúk, str. Konrádova 6/8, CS 052 01 Spiŝská Nová Ves M: 100

30. julio 25. — aŭgusto 1. Bydgoszcz/Pollando
N: Kongreso de TEVA
O: Tutmonda Esperantista Vegetara Asocio kaj Filio de PEA en Bydgoszcz
K: Filio de PEA en Bydgoszcz, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz
P: 100 rbl. aŭ 300 GDR-mk A: 25. 6. 1980 M: 100

31. julio 27. — aŭgusto 1. Gdansko/Pollando
N: Antaŭkongreso de UEA
OK: Filio de PEA en Gdansko, str. Legnicka 2/1, PL 80-200 Gdansk
P: 100 rbl. aŭ 300 GDR-mk A: 30. 6. 1980 M: 400

32. julio 27. — aŭgusto 9. Lanĉov/Ĉehoslovakio
N: XXVII. Somera Esperanto-Tendaro (SET), 3-a etapo
OK: ČEA, Jilská 10, CS 110 00 Praha
P: 1150 ĉs. kronoj, infanoj ĝis 10j. 600 ĉs. kronoj

33. aŭgusto 1. — 14. Smoljan/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 1. 7. 1980 M: 200

34. aŭgusto 9. — 23. Eger/Hungario
N: Somera Esperanto-Lernejo en Eger (SELE)
OK: Departementa Komitato de HEA, Eger, Pf. 105, H-3301 M: 40

35. aŭgusto 12. — 26. Wladyslawowo/Pollando
N: Somera Esperanto-Lernejo (SELWO-80)
OK: Filio de PEA en Bydgoszcz, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz
P: 160 rbl. aŭ 480 GDR-mk A: 10. 7. 1980 M: 120

36. aŭgusto 16. — 29. Smoljan/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 15. 7. 1980 M: 200

37. aŭgusto 29. — 31. Usti nad Labem/Ĉeĥoslovakio
N: Seminario „Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko"
O: Scienc-teknika Sekcio de ČEA
K: Jiři Patera, Na usedlosti 1534, CS 140 00 Praha 4 P: 50 ĉs. kronoj

38. septembro 1. — 14. Smoljan/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 1. 8. 1980 M: 200

39. septembro 1. — 14. Varna/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj ĉe la maro
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 1. 8. 1980 M: 150

40. septembro 2. — 15. Miedzygórze/Pollando
N: XVI. Internacia Esperanto-Feriado „Ora Pola Aŭtuno"
OK: Filio de PEA en Wroclaw, pk. 16, PL 50-952 Wroclaw
P: 240 rbl. aŭ 720 GDR-mk A: 31. 7. 1980 M: 300

41. septembro 12. — 15. Opava/Ĉeĥoslovakio
N: IV. Kultura Festivalo de ČEA
OK: ČEA, Jilská 10, CS 110 00 Praha P: ĉ. 460 ĉs. kronoj

42. septembro 16. — 29. Smoljan/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 15. 8. 1980 M: 200

43. septembro 16. — 29. Varna/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj ĉe la maro
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 15. 8. 1980 M: 150

44. septembro 18. — oktobro 2. Velingrad/Bulgario
N: Internacia Ferio-Seminario
O: Loka Esperanto-societo
K: Manol Čolev, Br. Krastini 14, BG 4600 Velingrad A: 15. 8. 1980 M: 100

45. oktobro 1. — 14. Smoljan/Bulgario
N: Internacia Konferenco de Turismaj Esperanto-Organizantoj.
Internacia kurso por Esperanto-ĉiĉeronoj kaj ekskursgvidantoj.
O: Monda Turismo kaj Internacia Esperanto-Kursejo
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 1. 9. 1980 M: 80

46. oktobro 1. — 14. Varna/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj ĉe la maro
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 1. 9. 1980 M: 150

47. oktobro 16. — 29. Smoljan/Bulgario
N: Ora Esperanto-Feriado kun Eseranto-Kursoj
K: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 1. 9. 1980 M: 80

48. oktobro 16. — 29. Varna/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj ĉe la maro
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 15. 9. 1980 M: 150

49. novembro 1. — 14. Smoljan/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 1. 10. 1980 M: 200

50. novembro 1. — 14. Varna/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj ĉe la maro
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 1. 10. 1980 M: 150

51. novembro 8. — 13. Bydgoszcz/Pollando
N: VI. Internacia Foiro de Esperanto-Turismo
T: debatoj pri la internacia E-turismo, subskribado de kontraktoj pri grupinterŝanĝo en la 1981-a jaro, VII. Internacia Trarigardo de Lumbildoj „Esperanto-Somero 1980", anonco de la Konkurso de Monda Turismo, kultura kaj turisma programo
O: Monda Turismo kaj Filio de PEA en Bydgoszcz
K: Filio de PEA en Bydgoszcz, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz
P: 120 rbl. aŭ 360 GDR-mk (inkl. vojaĝon Varsovio–Bdygoszcz–Gdansko–Torun–Varsovio) A: 10. 10. 1980 M: 100

52. novembro 16. — 29. Smoljan/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 15. 10. 1980 M: 200

53. novembro 16. — 29. Varna/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj ĉe la maro
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 15. 10. 1980 M: 150

54. decembro 1. — 14. Smoljan/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 1. 11. 1980 M: 200

55. decembro 1. — 14. Varna/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj ĉe la maro
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 1. 11. 1980 M: 150

56. decembro 15. — 29. Smoljan/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 15. 11. 1980 M: 200

57. decembro 16. — 29. Varna/Bulgario
N: Feriaj Esperanto-Kursoj ĉe la maro
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio A: 15. 11. 1980 M: 150

58. decembro 28. — januaro 2. Budapeŝto/Hungario
N: 10a Vintra Esperanto-Ferio (VEF)
OK: Departementa Komitato de HEA, Budapest, Pf. 153, H-1443

59. decembro 29. — januaro 2. Smoljan/Bulgario
N: Internacia Novjara Balo
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio

60. decembro 30. — januaro 3. Varna/Bulgario
N: Internacia Novjara Balo
OK: Internacia Esperanto-Kursejo, PK 791, BG 1090 Sofio

Pri aranĝoj en Pollando kaj Bulgario 1980

Speciale multaj Esperanto-aranĝoj 1980 okazos en Pollando kaj Bulgario. Jen kelkaj utilaj informoj:

1. POLLANDO
Ĉiu civitano de GDR povas enpagi la necesan sumon al **Narodowy Bank Polski, Głowny Oddzia Walutowo-Dewizowy, PL-00 950 Warszawa, Konto: Pola Esperanto-Asocio, n-ro 1111-243247-151-6201.**

La aliĝilojn (postulendaj ĉe la respektiva organiza komitato) kaj fotokopion aŭ kserokopion de la enpaga konfirmilo de la banko de GDR oni sendu al la organizantoj (Filio de PEA) aŭ al **PEA-Turismo, PL-85-094 Bydgoszcz, str. M.-Curie-Sklodowskiej 10, Pollando.**
Jen kelkaj aranĝoj

● 1. — 8. 6. 1980 Ustronie Morskie apud Koszalin
V. Čebalta Esperanto-Printempo
Tiu-ĉi tradicia kaj altnivela Esperanto-aranĝo okazos ankaŭ ĉi-foje, anstataŭ en Mielno, en Ustronie Morskie ĉe Balta Maro apud Koszalin. Kiel kutime la programo elstaros laŭ riĉeco de kulturaranĝoj kiuj okazos dum la tuta semajno. Speciale substrekinda estas Internacia Seminario por Esperanto-Tradukistoj. Okazos ankaŭ interesaj ekskursoj. Eblos sunbruniĝi kaj naĝi en Balta Maro. Loĝado kaj manĝado en komforta ripozdomo.
Prezo: 120 rubloj aŭ 360 GDR-markoj
Organizanto: Filio de PEA en Koszalin, pk. 30, PL-75-950 Koszalin

● 16. — 27. 6. 1980 Miedzyzdroje
VII. Internacia Esperanto-Feriado
Tradicia feriado ĉe Balta Maro. Loĝado en 2-personaj kabanoj (kun lavejo kaj necesejo) en komforta kampadejo. En la programo: lingvaj kursoj (elementa kaj konversacia laŭ UEA-programo) konkursoj, prelegoj, teatrajo k. t. p.
Prezo: 230 rubloj aŭ 690 GDR-markoj
Organizantoj: Turisma Oficejo „Gromada" kaj Filio de PEA en Szczecin
Korespondadreso: „Gromada", Pl. Lotnikow 7, PL-70-414 Szczecin

● 2. — 15. 9. 1980 Miedzygorze
XVI. Internacia Esperanto-Feriado „Ora Pola Aŭtuno"
Populara feriado en Sudeta Montaro. Loĝado en la ripozdomo „Gigant" (2-personaj ĉambroj), manĝado tri fojojn tage. En la programo: Esperanto-kursoj (laŭ UEA-programo), III. Esperantologia Seminario, prelegoj, artaj vesperoj, balo de ĉifonuloj. Ŝakturniro, Esperanto-kantoj, ekskursoj.
Prezo: 240 rubloj aŭ 720 GDR-markoj
Organizanto: Filio de PEA en Wroclaw, pk. 16, PL-50-952 Wroclaw

● 12. — 26. 8. 1980 Wladyslawowo
Somera Esperanto-Lernejo „SELWO-80"
Revenante el la UK en Stokholmo oni povas per rekta pramo atingi Gdanskon kaj

post 50 km veni al Wladyslawowo — ripozloko ĉe Balta Maro. Tie okazos tradicia jam SELWO, aranĝata kunlabore kun AESSR, kun ĉ. 120 partoprenantoj. Loĝado en moderna ripozcentro (2 — 4-personaj ĉambroj kun banejo), manĝado tri fojojn tage. En la programo diversgradaj kursoj (laŭ UEA-programo), ekskurso al Gdansko, Sopot kaj Gdynia, al Westerplatte kaj al Hel, ebleco sunbruniĝi kaj naĝi en la maro.
Prezo: 160 rubloj aŭ 480 GDR-markoj

Organizanto: Filio de PEA en Bydgoszcz, str. M.-Curie-Sklodowskiej 10, PL-85-094 Bydgoszcz

● **Internaciaj Esperanto-Kursoj en Pollando 1980** laŭ la programo de UEA, Varsovio — Bydgoszcz — Varsovio kun ekskursoj al Torun kaj Gdansk: 8. — 15. 6. 1980 / 15. — 22. 6. 1980 / 22. — 29. 6. 1980 / 29. 6. — 6. 7. 1980 / 6. — 13. 7. 1980 / 13. — 20. 7. 1980.

Ses unusemajnoj restadoj en **Bydgoszcz** kun 24-hora Esperanto-kurso laŭ la programo aprobita de UEA kaj kun abunda kultura kaj turisma programo. Eblas ankaŭ aldone mendi 10 horojn de ĉevalrajdado.

Prezo: sen ĉevalrajdado 100 rbl. aŭ 300 GDR-mk, kun ĉevalrajdado 160 rbl. aŭ 480 GDR-mk

Organizanto: Filio de PEA en Bydgoszcz, str. M.-Curie-Sklodowskiej 10, PL-85-094 Bydgoszcz

● 27. 7. — 1. 8. 1980 **Gdansk**
Antaŭkongreso de UEA
Dum la Antaŭkongreso de UEA oni prezentas al partoprenantoj:

— kaŝuban folkloron kaj arton, ĝian specifan karakteron / — belecon de Kaŝuba Regiono — antikvaĵojn de la malnova urbo Gdansk.
La programo de Antaŭkongreso certigas eblecon:

— ekscii kiamaniere per Esperanto diskonigi la lokan kulturon / — ekkoni parton de arta kongresa programo, kiun prezentos polaj artistoj / — partopreni riĉan kulturan kaj turisman programon kune kun novaj kaj malnovaj geamikoj.
En la programo:

— Inaŭguro de la Antaŭkongreso kun arta folklora programo / — dum la seminario oni priparolos la temon „Utiligo de Esperanto por la diskonigo de loka kulturo“
— en Etnografia Muzeo ni vizitos ekspozicion de kaŝuba popola arto
— per aŭtoĉaroj ni vizitos Kaŝuban Regionon nomatan „Kaŝuba Svislando“
— ĉe tendarfajro prezentos sin popolaj artistoj de diversaj regionoj
— Pupteatro „Rabcio“ el Rabka prezentos spektaklon „Pri Zviritanto Muzikanto“
— la antikvaĵojn de urbo Gdansk vi povos viziti laŭ tri libere elektitaj itineroj
— en Oliva vi povos admiri Katedralon kaj orgenmuzikon
— dum tradicia balo okazos prezentado de virina modo kun folkloraj motivoj.

Partoprenkondiĉoj: Partopreni povas ĉiu esperantisto aliĝinta ĝis 1-a de julio 1980. La antaŭkongresanoj loĝos en studenta domo de la Gdanska Politekniko (en dupersonaj ĉambroj). Manĝoj — tri fojojn tage en studenta manĝejo (unua — tagmanĝo 27. 7., lasta — matenmanĝo 1. 8. 80).

Prezo de la Antaŭkongreso: 100 rubloj aŭ 300 GDR-markoj

Organizanto: Pola Esperanto-Asocio, Filio en Gdansko, str. Legnicka 2/1, PL-80-200 Gdansko, Pollando

La partoprenkotizo estas enpagenda al la supre menciita banko kun indikita kontonumero.

2. BULGARIO

La Feriaj Esperanto-Kursoj en Smoljan kaj Varna (vidu sur paĝoj 19—22 la numerojn 2, 3, 9, 10, 18, 27, 33, 36, 38, 39, 42, 43, 45, 46, 47, 48, 49, 50, 52, 54, 55, 56, 57, 59, 60) estas idealaj por komencantoj. La prezoj varias en Smoljan (laŭ lito-nombro en trilita apartemento por familio ĝis 8-lita ĉambro) de 189 ĝis 133 levoj por persono. En Varna la ĉambroj estas precipe dulitaj. Lito kostas, depende de la sezono, inter 210 — 132 levoj.

Limdato por aliĝo: por unuopuloj — unu monato antaŭ la komenco de la aranĝo, por grupoj — tri monatojn pli frue.

La partoprenkotizojn oni sendu al **Vánschnotargovska banka, Konto 422162-8, Internacia Esperanto-Kursejo, Sofio**

Aliĝilojn oni sendu al **Bulgario, 1090 Sofio, pk 791, Internacia Esperanto-Kursejo.** Ĉiu partoprenanto **devas** partopreni ĉiutagan 4-horan kurson de Esperanto.

KORESPONDDEZIROJ 31635

Bulgario

Filologino de germana kaj rusa lingvoj dez. kor. tutmonde pri lingvoj, lingvoinstruado, kulturo, literaturo, poezio, muziko: Veselina Gaĉeva, **1505 Sofio,** ul. Plaĉkovski manastir 21, vh. 5, ap. 14

Junulino, 16j., dez. kor. tutmonde pri literaturo, matematiko, muziko, kol. pm, bk, gramofondiskojn: Mariana Bojanova, **u. Pleven,** str. „Asen Zlatarov" 44

Okaze de 110a naskiĝdatreveno de V. I. Lenin, E-Soc. „Kolombo de la paco" organizos komence de aprilo letervesperon kun ekspozicio kaj petas ĉiujn sendi fotojn de lokoj kie loĝis Lenin, de muzeoj, uzinoj, stratoj, urboj, lernejoj je lia nomo, ankaŭ librojn, memoraĵojn pri li aŭ nacilingvajn artikolojn de personoj konintaj V. I. Lenin. Rekompenco certa. Samtempe ni serĉas daŭran kontakton kun E-kluboj tutmonde. Adreso: Esperanto-Societo „Kolombo de la paco", 6280 **Gálábovo,** str. „Stara Planina 12

ČSSR

Ladislav Šéra, Komenského 44, 042 22 **Košice,** dez. kor. kun filatelistoj el GDR

GDR

Gelernantoj el Leipzig dez. kor.:

— Barbara Michaelis, 37j., **7021 Leipzig,** Erlenstr. 8, dez. kor. kun ČSSR-anoj

— Monika Groh, 27j., **7010 Leipzig,** Kolonnadenstr. **18,** dez. kor. tutmonde

— Ingeborg Hoenigk, 44j., **7050 Leipzig,** Bergstraße 9, dez. kor. tutmonde pri turismo, kol. bk

— Alfred Hoenigk, 39j., **7050 Leipzig,** Bergstraße 9, dez. kor. tutmode pri mapoj, turismo, laboro en bibliotekoj, kol. bk

— Margit Kunze, 23j., **7010 Leipzig,** Käthe-Kollwitz-Str. 115, dez. kor. tutmonde

— Manfred Kunze, 35j., **7010 Leipzig,** Käthe-Kollwitz-Str. 115, dez. kor. tutmonde

— Peter Thom, 17j., **7152 Böhlitz-Ehrenberg,** Karl-Marx-Str. 51, dez. kor. tutmonde

— Margita Hilbert, 21j., **7050 Leipzig,** Hildegardstraße 28, dez. kor. kun hungaranoj pri kudro

— Barbara Leipert, 21j., **7050 Leipzig,** Reclamstr. 1, dez. kor. kun bulgaranoj kaj alilandanoj pri kudro kaj kunikloj

— Familio Pfeifer (3 personoj), **7022 Leipzig,** Marbachstr. 6, dez. kor. kun hungara kristana familio pri arto kaj muziko

Lernantino, 16j., dez. kor.: Birgit Becker, 3603 **Dingelstedt,** Bahnhofstr. 233a

Katrin Zywicki, 2000 **Neubrandenburg,** Mudder-Schulten-Str. 14, dez. kor. kun 14j. knabino

Hungario

Kasistino 36j., komencantino, dez. kor.: Istvánne Deák, **H-1184 Budapest,** Kesrövre u. 14/a IIe. 8

Jugoslavio

Studentino, 19j., dez. kor.: Ida Ferro, ul. Pionirska 40, 52 215 **Vodnjan**

Mongolio

Ĥ. Suhĝargal, **Ulan-Bator,** 19a mikrorojak, p.kesto 36/54, 18j., dez. kor. kun esperantistino el GDR

Rumanio

Lernantino, 14j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Csilla Molnar, str. Cîmpului 26, 3280 **Sîng. de Pâdure**

Lernantino, 14j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk: Irma Gall, str. Principalá 259, **3284 Viforoasa**

Lernantino, 15j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk: Elisabeta Trufán, str. Belszeg 56, **3284 Viforoasa**

Herausgeber: Kulturbund der DDR
(Zentraler Arbeitskreis Esperanto)
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 368